WIKIPEDIA

Sveda signolingvo

La **sveda signolingvo** (svede *Svenskt teckenspråk*, ofte pli mallonge nur *teckenspråk*) estas gestlingvo uzata en Svedio. Temas pri la unua aŭ preferata lingvo de proksimume 10 000 surdaj homoj en Svedo. La lingvo utiligas spacon kaj engaĝas movojn kaj aranĝojn de la manoj, korpo, vizaĝo, kaj kapo. Miloj da pliaj homoj kiuj estas ne surdaj ankaŭ uzas la signolingvon, kiel parencoj de surdaj homoj, signolingvaj interpretistoj kaj aliaj kiuj havas kontakton kun la surda komunumo.

Sveda signolingvo	
svede ***Svenskt teckenspråk***	
Parolata en	Svedio
Signantoj	ĉ. 10 000
	Lingvaj kodoj
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	sgn-SW
ISO 639-3	swl
Glottolog	swed1236
Angla nomo	Swedish Sign Language
Franca nomo	langue des signes suédoise

La sveda signolingvo ekhavis oficialan statuson kiel ”la lingvo de surduloj” en 1981. Depost 1983, ĝi estas ĝenerale uzata kiel instrulingvo en svedaj lernejoj por surduloj. Antaŭe, la instruado okazis pere de liplegenda sveda parollingvo, ĉar politike superregis la strebado integri la surdulojn en la ceteran socion, kaj minoritataj lingvoj estis subpremataj pli ĝenerale. De post oficialigo de la sveda signolingvo, la parollingvo ne plu estas instruata al surduloj, sed tamen la skriblingvo.

La finna signolingvo originis el la sveda signolingvo, kvankam la finna parollingvo ne parencas al la sveda. Pro tio finnaj surduloj pli bone komprenas svedajn surdulojn ol parolantaj finnoj komprenas parolantajn svedojn.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Sveda_signolingvo&oldid=5168199"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:20, 5 apr. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.